**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 42

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** Riĉulo havas kornojn, malriĉulo **d** ␣ **rn** ␣ ␣ ␣.

**2.** Nuntempe neniu uzas japanstilan ombrelon faritan el ␣ ␣ **mb** ␣ ␣ kaj papero, tamen, aŭdante la kanton, japanoj nepre imagas patrinon en kimono kaj kun *geta*.

**3.** Komence de la 6a jarcento p.K., oni komencis registri vastajn ␣ **p** ␣ **d** ␣ **m** ␣ ␣ ␣ ␣ de variolo en Eŭropo.

**4.** Por ĉiu horo de la tago la reĝo havis apartan **s** ␣ **rt** ␣ **t** ␣ ␣, kaj kiel pri ĉiu alia reĝo oni ordinare diras: “li estas en la konsilanejo”, oni tie ĉi ĉiam diradis: “la reĝo estas en la vestejo”.

**5.** Nepre neniu artikolo komenciĝu kun titolo malsupre en iu ␣ ␣ **l** ␣ **mn** ␣ kaj daŭrigu supre de la sekva!

**6.** Dum kvin minutoj la 43-jara paraŝutisto troviĝis en libera falo, kaj en alteco de 1,5 km super la tero li malfermis sian ␣ ␣ **r** ␣ **ŝ** ␣ **t** ␣ ␣.

**7.** De du tagoj laboristoj klopodis maski per riĉaj **t** ␣ **p** ␣ **t** ␣ ␣ la nudecon de muroj.

**8.** Ĉar ni jam fariĝis vojkamaradoj kaj krom tio ni de la infaneco ĉiam estis kune, ni trinku nun porfratiĝon, kaj ni estu pli **f** ␣ **m** ␣ **l** ␣ ␣ **r** ␣ ␣ unu kun la alia.

**9.** Oni prirabis Viktor kaj nun li havas nek bileton, nek pasporton, nek monon, la konduktoro verŝajne bone komprenis lin de liaj ␣ **r** ␣ **g** ␣ **k** ␣ ␣ mienoj, gestoj kaj larmoplenaj okuloj.

**10.** La policistoj ne ␣ ␣ **sp** ␣ **n** ␣ ␣ pri profesia akvoĵetilo, ili uzis, por iom malvarmigi la protestantojn, normalan fajroestingan veturilon de la viena fajrobrigado.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** Dum la jaroj de la unua mondmilito malsaniĝis je **g** ␣ ␣ **p** ␣ en la mondo ĉirkaŭ 500 milionoj da homoj, el kiuj 20 milionoj mortis.

**2.** Ekde la jaro 1955 oni konstruas horloĝojn, kies tempomezurado estas bazata sur la vibracioj de **at** ␣ **m** ␣ ␣ de la elemento Cezio-133.

**3.** Mi legis la rememorojn de **g** ␣ **n** ␣ **r** ␣ **l** ␣ de Gaulle kaj unu ties frazo min ridetigis: ĝi priskribis Francion, kiel landon kies sorto estas “perfektaj sukcesoj kaj rigoraj malfeliĉoj”.

**4.** En la frua printempo de la jaro 1915 armitaj soldatoj de la **gva** ␣ **d** ␣ ␣ de la Junaj Turkoj ekstaris antaŭ la domo de Stakian, frapegis la pordon kaj postulis transdoni ĉiujn virojn.

**5.** Fine de la jaro aperis libro pri la tiel nomata spindele plektita **p ␣ nt␣** de la nord-slovaka regiono Liptov, kiu falis en forgeson.

**6.** Kunulo **b ␣ nd ␣ ĝ ␣** firme la morditan kruron aŭ brakon kaj malpermesu al la viktimo movi tiun korpoparton, por ke la veneno ne atingu la koron, kaj sekve rapidu hospitalen.

**7.** Sub la tegmento de policeja korto ni nodligis niajn hamakojn kaj vespere komencis manĝi **s ␣ n ␣v␣ ĉ ␣ ␣ ␣** ĉe la lumo de du kandeloj.

**8.** La plej fama kaj sukcesa alpisto de ĉiuj tempoj estas kritikanto de la amasa **t ␣ r ␣ s ␣ ␣** kaj de neniigo de la montaroj.

**9.** Inter aliaj aferoj tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri **ĉ ␣ rp ␣** akvon en tre malproksima loko kaj alporti domen plenan grandan kruĉon.

**10.** Li ekstaris sub la jarcenta **s ␣ l ␣ k ␣** kaj provis rememori, kie ĝuste en la sonĝo li vidis la junulinon en la blanka robo.

**Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

| |
|---|
| unik', oper', nervoz', vertikal', bagatel', opon', indulg', tener', teknik', ekspluat'. |

**1.** Britaj **␣ p ␣ ␣ ␣ ␣ t ␣ ␣** de la eŭro lanĉis dum la somero kinejan kampanjon por atentigi aparte junulojn pri la teruraĵoj de la eŭro.

**2.** Ĉiujare en Finnlando aperas **␣ ␣ ␣ k ␣ ĵ ␣**, kiu interesas novajn gepatrojn kaj adoptintojn: jam de pli ol duonjarcento la ŝtato donacas beboprizorgan pakaĵon.

**3.** Se min subite vizitas bona ideo, mi tuj serĉas pretekston por skoldi miajn familianojn kaj ĉiuj en la hejmo komencas senbrue paŝi kaj penas ne ĝeni min per **␣ ␣ g ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ĵ ␣ ␣**.

**4.** Maladekvata aŭ krima agado en ŝtataj funkcioj ne estas tolerebla, sed ankaŭ la **␣ ␣ n ␣ ␣ ␣ ␣ l ␣ ␣ ␣** akuzantoj demandu sin, kiaj homoj ili mem estas.

**5.** Iom ĝena tamen estas la tro stereotipa aŭtomata akompanado helpe de modernaj **␣ ␣ k ␣ ␣ ␣ ␣ ĵ ␣ ␣**, ne muzikiloj sed sonsinteziloj.

**6.** Membroj de gejunula koruso Magnificat studas proksime al la **␣ p ␣ ␣ ␣ j ␣** kaj vespere rolas aŭ kantas en operaj prezentadoj.

**7.** La maldensiĝo kaj la ŝrumpiĝo de la somera glacitavolo en la arkta regiono malkaŝas grandegajn **␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ t ␣ ␣ l ␣ ␣ ␣**, kiuj koncernas nafton kaj gason.

**8.** En la kvadratoj de la krucvortenigmo estas la unuaj literoj de ĉiuj vortoj-respondoj, via tasko estas nur difini horizontalecon kaj **␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ l ␣ c ␣ ␣** de la respondoj.

**9.** La dommastrino havis por mi komplezojn, prizorgojn, delikataĵojn, kaj eĉ bruskan **␣ ␣ ␣ ␣ r ␣ c ␣ ␣**, kiu ne malplaĉis al mi.

**10.** La eniro de dekstremuloj en la registaron en Aŭstrio kaŭzis **␣ ␣ ␣ ␣ ␣ z ␣ c ␣ ␣**.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** La diverseco spronas la konfliktojn en mezoriento sen ebloj de vera ŝanco pri harmonia kunvivado kaj malebligas racian ___ fare de la individuoj.

**a.** rezonadon **b.** eskapadon **c.** grincadon **d.** forestadon

**2.** Mi ne emas ___ al la okcidentanoj, kiel ili vivu, mi tamen estas ege kontraŭ prezento de okcidentaj valoroj kiel la solaj ĝustaj kaj universalaj.

**a.** prononci **b.** impliki **c.** preskribi **d.** inventi

**3.** Ginsengo asociiĝas kun ___ landoj: la ginsenga radiko kutime venas el Ĉinio, Koreio aŭ Siberio.

**a.** orientaj **b.** malicaj **c.** plenaĝaj **d.** civilaj

**4.** En internaciaj kontaktoj ne sufiĉe estas aplikata principo de lingva egaleco, kaŭze de tio estas ne respektata unu el la plej gravaj ___ de la bazaj homaj rajtoj.

**a.** ĝemeloj **b.** paseroj **c.** elementoj **d.** aksoj

**5.** Moodysson studis la kazon de 16-jara knabino el Litovio kiu estis "eksportita" al Svedio, post unu jaro kiel sekssklavino ŝi finis sian vivon saltante de ___.

**a.** cervo **b.** fikcio **c.** asfalto **d.** viadukto

**6.** Oni ne plu sentas ĉeeston de TEJO, eble plej konkrete en UK, jam en Aŭgsburgo 1985 kongresanoj ___, ĉar la junularo kunsidis ekster la kongresejo.

**a.** establis **b.** grumblis **c.** aktivis **d.** ekipis

**7.** Mi ___ tro multe la junajn sinjorojn, mi estis tro ĵetata el la brakoj de unu sinjoro en la brakojn de alia, kiel vi vin tiel bonguste esprimis!

**a.** sarkis **b.** koketis **c.** protestis **d.** oponis

**8.** Ĉiu scias, kiun kaj kian atenton altiras ajna ___ bagatelo el la vivo de princoj kaj prezidentoj.

**a.** vegetara **b.** graveda **c.** raŭka **d.** intima

**9.** Ni manĝis ___ kun kvaso kaj rostitajn fiŝojn, kaj en la ĉambro tia malbonodoro estis, ke ĝi naŭzus la diablon.

**a.** plastikon **b.** konkurson **c.** bukedon **d.** rafanon

**10.** *La kosmo kaj ni* instruas orientiĝi inter steloj kaj ___ kaj – tio estas ne malpli grava – trovi, mezuri kaj apreci nian propran situon en la mondo.

**a.** cirkuleroj **b.** planedoj **c.** bukloj **d.** fantazioj